# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisionde UEA

17-a jaro, n-ro 47(2023 :10)

# ENHAVO

ENHAVO ..... 1
ENKONDUKO ..... 2
LA TORINA UK ..... 4
NOVAĴOJ EL LA UK KAJ IJK ..... 7
KONGRESETO ..... 9
EKZAMENO ..... 9
Lydie rakontas pri ijk ..... 9
LA 109A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN ARUŜO/TANZANIO ..... 10
MESAĜO DE ESTRARANO DE UEA PRI AFRIKO ..... 11
MESAĜO DE LOKA KONGRESA KOMITATO ..... 12
AFRIKA RETRADIO ..... 13
ESPERANTO-TAGO ..... 14
REZULTOJ POST LA 8-A AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO ..... 15
ORFINO KUMBA ..... 15
VIA MERKATO, KOMPANIO SUB E-NOMO EN SENEGALO ..... 17
Novaĵoj el Demokratia Respubliko Kongo ..... 18
NOVAĴOJ EL BURUNDO ..... 20

# ENKONDUKO


*Karaj legantoj,*

*Ni estas tre dankaj pro via fideleco kaj amo parte al nia revuo kaj precipe al via zorgo pri la Esperanto-movado en Afriko.*

*Kiel vi scias, la longe atendata unua kaj unika Universala Kongreso en Afriko jam estas la ĉiutageca aktualaĵo kaj prioritato por la Afrika Komisiono. En ĉi tiu numero vi legos informojn pri la ĵus okazinta Universala Kongreso de Esperanto (U.K.) en Torino, pri diversaj agadoj tra Afriko kaj alispecaj agadoj, kiuj iel ajn diskonigas informojn pri la ekzisto de Esperanto en Afriko.*

***La Redakcio***

*********************************************************************************


109-a Universala
Kongreso de Esperanto
Aruŝo, Tanzanio
3 — 10 aŭgusto 2024
La Universala Kongreso de Esperanto venos al Tanzanio!
Aliĝu al la 1-a UK en Afriko: uk.esperanto.net/2024

# LA TORINA UK

Partopreno de Afrikanoj en la Torina Kongrso




La 108a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Torino/Italujo ĉi-jare rekordis je nombro da partoprenantoj el Afriko. Ĉeestis la Kongreson delegacio el Tanzanio, la kongeslando en 2024. La celo estis ke tiu delegacio, majori4tate konsistanta el Membroj de Loka Kongresa Komitato por la venontjara Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Aruŝo/Tanzanio spertiĝu pri organizado de Universala Kongreso de Esperanto. Krom la LKK-delegacio, partoprenis ankaŭ tri Membroj de la Afrika Komisiono.

## PREMIO DOGUĉ KAJ DIPLOMOJ

En solena Fermo de la 108a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Torino estis anoncita la disdono de 12 diplomoj pri Estrara Agado aŭ pri Estara Arta Agado por la jaro 2023, Esperantistoj el Afriko ankaŭ ricevis la diplomojn, kaj la Premio Doguĉi 2023 aljuĝita al Miora Raveloharison

## Diplomoj aljuĝitaj al :

**Espoir Ngoma Kasati (D.R. Kongo)** pro vasta instruado de Esperanto en Afriko, surloke kaj rete,



aparte en lernejoj de Uviro (D.R. Kongo) kaj en Tieso (Senegalo), okaze de la preparoj por la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, kaj pro la kontibuoj por starigo de Junularaj organizoj kaj en Orienta Afriko kaj en Senegalo

**Mana Brinson Namutema (D.R. Kongo)** pro la organizado de la movado en regiono malstabila pro



milito, pro partoprenigado de junuloj en afrikaj E-eventoj (aparte pri dekoj da junuloj al la 7-a Afrika Kongeso de Esperanto en Burundo) kaj pro la konstruo kaj tenado de Esperanto-domo por akcepto kaj edukado de infanoj, inkluzive kun enplekto de neesperantistoj, asistado, alfabetigado kaj instruo de Esperanto

# La premio Doguĉi al Miora Raveloharison



Premio Deguĉi 2023 al Miora Raveloharison UEA starigis la Premion Onisaburo Deguchi (https://uea.org/teko/regularoj/regularo_premio_deguchi) - aŭ Premio Deguĉi - en la Jubilea Jaro 1987, pere de fonduso proponita kaj starigita de Esperanto-Populariga Asocio de Oomoto (EPA), faka organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun UEA. La premio distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de la religia gvidanto de Oomoto, Onisaburo Deguchi (Deguĉi). Spegule al iliaj ideoj la premio ankaŭ celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA. La Premio Deguĉi konsistas el diplomo kaj monsumo de 1000 EUR. Ĝis nun 30 homoj kaj 8 iniciatoj estis premiitaj kaj nun estas anoncata la 31-a homo. Per decido de la Estraro de UEA la Premio Deguĉi de la jaro 2023 estas aljuĝita al : Miora Raveloharison.

Doktorino RASOHARINAIVO Mioranantenaina, pli konata kiel Miora Raveloharison, naskiĝis la 20-an de aŭgusto 1980 en Antananarivo, la ĉefurbo de Madagaskaro. Ŝi estas lertigistino kaj nuntempa membro de la Afrika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio, respondeca pri virina agado kaj kulturo. Ŝi kaj la edzo estas gepastoroj, gepatroj de juna filo, Jonathan. Ŝi konatiĝis kun Esperanto, kiam ŝi studis en liceo, en 1997, per libreto verkita en multaj lingvoj, unu el tiuj estis Esperanto. Pro scivolemo ŝi esploris pri la lingvo kaj eklernis ĝin. Helpis ŝin kompletigi sian lernadon kaj definitive esperantistiĝi la libro "Dio estas Amo", de la bretono Erwan ar Menga.

Laborante en la sudorienta parto de sia lando, ŝi trovis okazon komenci instrui Esperanton kaj anoncis sian kurson en la regiona radio dum 15-minuta

programero. Tiam aperis ŝiaj unuaj 23 gelernantoj. Ŝi ne plu ĉesis instrui la lingvon. Ŝi aparte instruas al infanoj kaj gejunuloj, uzante instrumetodon bazitan sur la uzo de kantoj, ludoj, ekskursoj kaj kulturaj interŝanĝoj, donante

plezuron al la sperto lerni. Frue post sia lernado ŝi komencis korespondi kun aliaj malagasaj esperantistoj kaj ekaktivis en la landa movado. Ŝi partoprenas en diversaj agadoj, movadaj, edukaj kaj socicelaj.

Ŝi ofte prelegas, gvidas trejnadojn, organizas konferencojn kaj kongresojn, diversfoje dividante siajn spertojn, cele ĉefe al la evoluigo de junulinoj kaj virinoj. Kun Alexandrine Omba el D. R. Kongo ŝi fondis Esperantistan Virinan Asocion en Afriko (EVAA) kaj en 2018 organizis la 1-an Afrikan Kongreson por Virinoj (AKVo), kiu okazis en Madagaskaro. Ŝi nuntempe estas en sia dua mandato kiel membro de la Afrika Komisiono de UEA. Ekde 2008 ŝi ankaŭ estas prezidantino de madagaskara sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI). Ŝi estas kunlaboranto en agado de la Universitato de Sevilo, kunordigita de Prof. Vicente (Viko) Manzano-Arrondo. Ŝi lastatempe kunlaboras kun aliaj malagasaj esperantistoj por revigligi la landan asocion de UEA kaj ĉiujn sekciojn de aliaj Esperanto-organizoj en Madagaskaro. Ja renkontiĝoj en ŝia lando aŭ en aliaj landoj, inter homoj de diversaj kulturoj en la mondo, fizike aŭ virtuale, markas la ĉiutagan Esperanto-vivon de Miora. Por ŝi Esperanto estas grava, aplikata kiel ilo por paca komunikado kaj disvolviĝo de solidareco kaj empatio inter homoj. Por ŝi la Esperanto-mondo estas mondskala interŝanĝejo, kie homoj estu instigataj malkovri unuj la aliajn, ricevi, kunhavigi, ĝui la diversecon de la mondo. Ŝi laboras, por ke Esperanto malfermu al homoj pordon al mondkomunikado. UEA uzas la okazon anonci pri la premio al Miora por gratuli ŝin kiel la unuan afrikanon, al kiu la premio estis aljuĝita kaj ankaŭ al EPA pro ĝia 100-jariĝo en 2023. La Premio Deguĉi estas inter la plej prestiĝaj de la Esperanto-movado.

## La tradicia afrika kunveno dum UK en Torino

Ankaŭ ĉi-jare la tradicia afrika kunveno dum Universala Kongreso de Esperanto okazis hibride en la salono Fighiera-Sikorskala, la 1-an de aŭgusto. Partoprenis la kunvenon ĉeeste trideko da kongresanoj kaj ankaŭ homoj defore. Dum pli ol horo estis vicaj atestoj far geamikoj de Afriko subtenantaj projektojn en la kontinento, salutvortoj al la kunveno. Citindas tiu de s-ino **Eva Kaluwa**, reprezentantino de la Tanzania diplomatia domo en Italio. La kunveno grandparte kaj escepte

enfokusiĝis pri la Aruŝa UK en 2024. **John E. Magessa** kaj **Costantine Mashauri** respektive sekretario kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) anoncis la kolorojn de la venontjara evento en la kontinento.

Ili per lumbildoj faris prezentojn pri sia hejmlando Tanzanio, la lando de la 109-a Univerasala Kongreso de Esperanto. Iliaj prezentoj kaptis atenton de pli ol unu persono en la salono.
La sukceso de la reta elsendo estas plena merito de **Francesco Maurelli**. Kvankam la ideo pri hibrida kunveno leviĝis lastminute, li helpis aranĝi kaj persone okupiĝi pri la teknika aspekto. Tiel dank' al li homoj, kiuj pro iuj kialoj kaj aliaj ne povis fari vojaĝon al Torino, povis defore spekti la kunvenon.

**Adjé Adjévi**

# NOVAĴOJ EL LA UK KAJ IJK

## Partopreno de tri afrika komisionanoj, senprecedenca rekordo

*La ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Torino/Italujo estis la unua kiu gastigis pli da afrikanoj kompare kun la antaŭaj. Tri membroj de Afrika Komisiono de UEA estis inter tiuj partoprenintoj....*

## Lydie rakontas siajn travivaĵojn dum UK kaj IJK

Mallonga biografio de Lydie Ranja el Madgaskaro

Mi eksciis pri Esperanto en la jaro 2018, de kolegino. Mi tre ŝatas fremdajn lingvojn, do tuj mi decidis lerni ĝin. Mi unue lernis rete kaj en 2019 mi renkontiĝis kun Henriel Fidilalao, kaj li instruis min per reta korespondado. En 2020, mi ekparolis kun amikoj el diversaj landoj per sociaj retoj. Dum la Zamenhofa Tago en 2021, mi renkontiĝis la unuan fojon kun Malagasaj Esperantistoj, kaj fariĝis la kasistino de MEJA ( Malagasa Esperantista Junulara Asocio ). En januaro 2022, mi publikigis mallongan rakonton «La Sorto de Aina», originale verkitan en Esperanto, per la granda helpo de mia germana amiko Ulrich Matthias. En oktobro, Patricio Iglesias proponis min al la Estraro de UEA kiel membron de la Afrika Komisiono, kaj vere oni elektis min tia. En decembro, mi partoprenis en la

Afrika Kongreso de Esperanto en Senegalo. Mia unua vojaĝo eksterlanden. Fine de julio kaj komence de aŭgusto 2023, mi partoprenis IJK-n kaj UK-n en Italio.

*Jen miaj paŝoj en la Esperanto-mondon!*

## Kiel mi sukcesis partopreni IJK-n kaj UK-n ?




Mi ĉiam volis vojaĝi al Eŭropo. Do kiam mi vidis la anoncon pri la konkurso « partoprenu IJK-n », organizitan de TEJO, mi senhezite sendis mian kandidatiĝon. Sincere, mi neniam pensis, ke mi sukcesos en ĝi, sed kandidatiĝi estis jam io granda  por mi. Sed, post kelkaj monatoj, mi vidis mian nomon afiŝitan kiel gajninto de la konkurso. Mi sukcesis. Mi ne povas priskribi mian feliĉon dum tiu tago!

Mi partoprenos mian unuan Internacian Junularan Kongreson. Kaj, poste UEA ofertis al mi la okazon partopreni ankaŭ la Universalan Kongreson. Mia feliĉo duobe pligrandiĝs. Estis granda ŝanco kaj granda oportuno por mi. Tamen, la defio estis la akiro de vizo, ne estis tiel facila!

Por afrikanoj, ricevi vizon por Eŭropo neniam facilas, precipe por virinoj. Kelkajn monatojn mi atendis. Mi fine ricevis ĝin nur en la tago de mia flugo, kiam mi ne plu esperis ekhavi ĝin, kia tago! La feliĉo, la streĉo! Rapide oni aĉetis la flugbileton kaj mi ekpretiĝis vojaĝi. Multajn obstaklojn mi renkontis, sed mi finfine sukcesis.

Sabate, je la 3a posttagmeze mi ekflugis. La disigo  de mia unujara bebo estis dolora, ĉar samtempe, li abrupte devis ĉesi mamsuĉi. Kaj por la patrino kaj por la infano, estis malfacila tempo.

## Mia unua Universala Kongreso

La 108a UK okazis en Torino de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto. Mi alvenis en Torinon dimanĉe la 30an de julio, dum la solena malfermo. Mi rimarkis tiam, kiom granda evento estas la Universala Kongreso. Multaj estis la partoprenantoj, laŭ la raporto de UEA estis 1319 homoj el 69 landoj. Per Esperanto, oni povis kompreni unu la alian.  Por mi, estis tre granda defio, ĉar la vivmaniero en Eŭropo havas grandegan diferencon kompare al la nia. Sed, mi neniam sentis min fremdulo, iu ĉiam

estis preta por helpi. En Esperantujo, ĉiuj vivis harmonie, pace, kaj frate. Mi partoprenis en diversaj programeroj, sed la plej interesa por mi estis la kongreseto por infanoj!

## KONGRESETO



Ĉar mi jam estas patrino , estis granda plezuro por mi helpi en la infana kongreseto. Mi estis tie dum du tagoj. Ĉiuj komprenis unu la alian, eĉ se la infanoj ankoraŭ ne bone regis Esperanton, ili jam havis kelkajn bazajn sciojn, kaj dum la kongreseto ili sekvis Esperanto-kurson. Ĉiun vesperon, ĉiuj sidiĝis ĉe ronda tablo por la tempo de origamio. Knaboj kaj knabinoj, silente faris siajn laborojn kun la instrukcio de la instruisto. Dum la ekskurso, por malkovri la grandan parkon, la infanoj devis solvi multajn enigmojn, en esperanta lingvo. La vojo estis longa, sed ili multe lernis dum tiu ludo, ankaŭ mi, mi konfesas. La leciono de rajdado estis feliĉiga tempo por la infanoj, ili ĝuis plene la momenton kun la helpo de profesiulo.

## EKZAMENO

Sincere, mi timis pri tiu ekzameno. Tamen mi decidis trapasi ĝin, ĉar ĝi okazas nur unufoje jare. Estis tre amuze, ĉar mi alvenis en la ekzamen-salono pli frue, kaj la gvidantino donis erare al mi temon por la nivelo C2. Mi jam traktis la demandon, kaj poste oni diris al mi, ke ĝi ne estis la bona. Do mi devis lasi ĝin kaj denove fari alian. Komence mi planis trapasi la nivelon B1, sed kiam mi komencis la parolan ekzamenon, la gvidantino Katalin proponis al mi trapasi la nivelon B2 anstataŭe; ŝi diris ke mia nivelo estis pli bona ol mi pensis. Dum la parola ekzameno, mi priskribis foton kiel al blindulo. Ĉiuj etaj detaleroj gravis. Post du tagoj, mi faris la aŭskultan kaj la skriban partojn, kiujn mi trovis iomete malfacilaj. Atendante, mi esperas havi bonan rezulton.

## Lydie rakontas pri ijk



Mi partoprenis la IJK-n de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto, en Lignano Sabbiadoro, kiel helpanto. La plej oftan tempon mi akompanadis prelegantojn por certigi la bonan funkciadon de la programo. Tamen, mi havis tempon por esplori iomete la urbon kaj ĝui ankaŭ la programon. Dum la IJK, mi renkontiĝis kun multaj junuloj, kaj ni povis interŝanĝi spertojn.

## Lingva festivalo

Mi organizis la lingvan festivalon. Dek sep homoj volis prezenti sian lingvon, sed pro manko de tempo, nur 10 povis: la malagasa, la korea, la litova, la rusa, la svisa, la kirunda, la svahila… estis momento ege riĉa je novaj scioj pri lingvoj, iomete pri ilia kulturo.

***LYDIE RANJA***

# LA 109A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN ARUŜO/TANZANIO

Dum longa tempo ekde la Bulonja Kongreso en 1905, la Universala Kongreso de Esperanto okazadas en aliaj kontintentoj krom en Afriko. Jen ĉi-foje, la termino ¨universala¨ ektrovas sian veran sencon, ĉar la Universala Kongreso de Esperanto unuafoje okazos en Afriko, tial la Estrarano de Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.) kaj la Afrika Komision de U.E.A sendas al ĉiuj niaj karaj legantoj kun aparta fokuso al Afrikanoj, la gastigantoj de la plej prestiĝa Esperanto-Evento en la mondo invitmesaĝon al kunlabro cele al enplektiĝi de ĉiuj por sukcesoplene okazigi tiun epokfaran Eventegon.

109-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

ARUŜO, TANZANIO, 3-10 AŬGUSTO 2024

Kiel sciate, la grandega revo de la plejmulto de la afrika esperantistaro estas iam alesti lan Universalan Kongreson de Esperanto, la plej granda monda esperanto-evento. Nun estas pli realisme ol iam ajn, la revo venontjare realiĝos kaj por la unua fojo, centoj, kial ne miloj da afrikaj esperantistoj havos la ŝancon fizike partopreni la tre prestiĝan esperanto-aranĝon, la Universala Kongreso de Esperanto.

Tuj post kiam la Estraro de UEA aprobis la okazigon de la Universala Kongreso de Esperanto (U.K.) en Tanzanio, esperantistoj tra la tuta Afriko fokusas sian agadon al la disvastigo de Esperanto kaj motiviĝas por gastigi tiun longe atendatan kongreson lingve preparante la ontajn kongresanojn el ĉiuj partoj de Afriko.

La prioritato nuna estas la Universala Kongreso, ĉar multaj afrikaj esperantistoj kredas, ke tiu kongreso venos ne nur por utiligi la uzadon de Esperanto en Afriko, sed ankaŭ plifortigi kaj konkretigi la movadon trakontinente.

Vi povas multe pli legi pri la kongreso ĉe : https://uea.org/vikio/%C4%88efpa%C4%9Do aŭ https://uea.org/vikio/Kategorio:Nova%C4%B5oj_-_Aru%C5%9Do

*Espoir Ngoma Kasati*

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de la Universala Esperanto-Asocio

# MESAĜO DE ESTRARANO DE UEA PRI AFRIKO

Karaj samkontinentantoj, Mi esperas ke vi ĉiuj tre bone fartas. Se vi legas ĉi vortojn, vi certes ricevis la bultenon de la Afrika Komisiono, kiu informas al vi kio okazas en la afrika movado. Vi jam aŭdis ke la Universala kongreso de Esperanto, la plej granda renkontiĝo de Esperanto okazos en Afriko venontan jaron, do por la unua fojo. Pluraj afrikanoj klopodis partopreni ĉii grandan eventon, sed nur malnlutaj sukcesis konkretigi la revon. Certe, estas multaj obstakloj :

- Financa obstaklo : Vi konas pli bone kiel mi ke estas malfacile por multaj el ni kolekti monon por vojaĝi al aliaj kontinentoj, aldone al la alta kosto de la flugbileto, estas malfacile havi monon por mendi loĝadon kaj restoracion. Certe estas ankaŭ aliaj kostoj kiel asekuro, transporto en la lando ….
- Vizo : La vizo-donaj instancoj havas preskaŭ ne plenigeblajn kondiĉojn por eldoni vizojn. Foje, la ambasado ne klarigas kialon ne doni vizon. Ne estas konataj kriterioj, foje du personoj en malsamaj situacio unu ricevas kaj alia ne ricevas !

Nun, la kongreso estas en nia kontinento. Mi ne dirus ke la kongreso venas solvi la financan flankon por ĉiuj afrikanoj, sed estos granda avantaĝo por esperantistoj, kiuj loĝas en Tanzanio kaj je najbaraj landoj de Tanzanio kiel Burundo, D.R. Kongo, Zimbabvo, Zambio, Malavio, Kenjo, Ruando… kiuj ne bezonos flugi al Arusha, jes ili povos vojaĝi tien per busoj. Ili ne bezonas vizon, granda avantaĝo, ĉu ne ? Por esperantistoj el foraj landoj de Tanzanio, la estraro de UEA klopodas solvi la situacion, ĝis nun ni estas sur bona vojo.

Kion ni atendas de vi ? Ni ŝatus ke ĉiuj alportu sian kontribuon, por ke la kongreso estu sukcesa. Kion ni atendas de vi ? Bona demando, ĉu ne ?
Dum Universala Kongreso okazas multaj interesaj programeroj, diskutoj, prelegoj…kaj certe en tiuj programeroj partoprenas parolantoj de Esperanto. Do ni petas al ĉiuj afrikanoj multnombre ekpreparîĝi. Serĉi vojaĝdokumentojn, diskonigi la informon al aliaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne estis informitaj.

La UK estu okazu lertiĝi lingve. Unu semajno da praktikado de nia kara lingvo sed antaŭ la UK bonvolu eklertiĝi mem, legu librojn, organzu renkontiĝojn en viaj kluboj. Estos okazo por multaj, kiuj ne laste uzis la lingvon, denove paroli ĝin.

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de la Universala Esperanto-Asocio

Plifortigu la instruadon en viaj kluboj, kaj ankaŭ kreu novajn klubojn. Jen tasko kiu atendas nin. Nun okazas kursoj per whatsapp kaj kaze ke vi ankaŭ preferas scii multon pri kiel efike instrui per whatsapp, bonvolu kontakti la afrikan komisionon.

Fine, la afrika komisiono sukcese starigis retradion. Estas radio de ĉiuj esperantistoj ĝenerale kaj afrikanoj specife. Bonvolu profiti de ĝiaj interesaj programoj. La Afrika Komisiono ankaŭ atendas viajn kontribuojn por la retradio, sendu artikolojn aŭ novaĵojn pri via agado.

Kune ni povas

**Jeremie SABIYUMVA**
**Estrarano de UEA**

# MESAĜO DE LOKA KONGRESA KOMITATO

Kilimanĝaro bonvenigas vin!

La tutmonda, viva aspekto de la plej prestiĝa Esperanto-renkontiĝo en Esperantujo esprimiĝis ankoraŭ ĉi-jare en Torino, kadre de la 108-a Universala Kongreso, per partopreno de homoj el ĉiuj kontinentoj. Afriko aparte estis reprezentita per aktivuloj el Angolo, Benino, Burundo, Madagaskaro, Niĝerio, Tanzanio kaj Togolando. Temis pri senprecedenca nombro da afrikaj partoprenintoj.

Ĝenerale estis bonegaj impresoj pri la renkontiĝo kaj pri la gastiginta urbo Torino. Gratulojn al ĉiuj entoj, kiuj kunlaboris pri la sukcesa aranĝo kaj dankon al ĉiuj partoprenintoj. Estis interese, ke multnombre kongresanoj venis ĉeesti la oficialan prezenton de John Magessa pri la venontjara Universala Kongreso, la unua en Afriko! Leviĝis oportune demandoj kaj venis kontentigaj respondoj jen de la LKK, jen de la Kongresa fako de UEA, jen de homoj alikontinentaj, kiuj iam vizitis Afrikon. Espereble, ĉio estis nun sufiĉe klara (kompreneble oni povas ankoraŭ, skribi, demandi, se oni bezonos pli da klarigoj)! Jam ne plu estas kialo por ne vojaĝi al Afriko. En Aruŝo ekzistas ĉiuj servoj, kiujn oni trovas en ĉiuj grandaj urboj: diversaj

hoteloj, buso, ATM- aŭtomato, polico, banko, apoteko, malsanulejo ktp. Kaj plia bona novaĵo: por alikontinentanoj ne estas devigo havi vakcinon por eniri Tanzanion!

Bonvolu jam nun komenci plani vian vojaĝon al la 109-a UK. Aruŝo ĝojas bonvenigi vin ĉiujn por spertigi vin pri la bunteco kaj riĉeco de Tanzanio, la hejmo de gravaj mirindaĵoj. Tie la LKK preparas por vi agreable neforgesablan kongreson en 2024. Bonvolu konsideri… kaj nun aliĝi al la 109-a Universala Kongreso ĉe: https://uk.esperanto.net/2024/ - por ĝui la plej favorprezan

La elektita kongresa temo estas : « *Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo* »

Bona novaĵo ankoraŭ estas, ke infanoj kaj gejunuloj sub la aĝo de 21-jaroj povas senpage aliĝi al la kongreso. Jen okazo por jam mem enskribiĝi (se oni mem estas en tiu aĝlimo) kaj instigi siajn

kursanojn, klubanojn... aliĝi ĉe  unikan) ŝancon de via vivo por (re)sperti, (re)ĝui la internacian Esperanto-etoson!

Ju pli frue vi aliĝas, des pli bone!


***Mesaĝo de la LKK de la 109-a Universala Kongreso.***

# AFRIKA RETRADIO



Afriko estas kontinento riĉa je diversaj kulturaj tradicioj kaj interŝanĝoj. La Afrika reta radio prezentiĝas kiel vojo por esprimi tiujn tradiciojn kaj kulturan diversecon al la tuta mondo samtempe diskonigante esperanton tra diversaj elsendo-programoj.

Tra la Afrika reta radio vi povas ekscii plurajn interesaĵojn ĉu movadajn aŭ alitemajn inkluzive de muziko ( kiu certe estas grava parto de la Afrika vivo), kultura filozofio kaj sciencoj. Intervjuoj kaj diskutoj kun artistoj kaj pluraj famuloj, kiuj estas la gravaj figuroj en la Afrikaj socioj povas esti spektaklaj kaj allogaj. Ekzemplo de elsendoj, kiujn vi povas aŭskulti estas interalie : Poemoj, kultura horo, intervjuo de internaciaj kantistoj kaj instrumentistoj,  agad-raportoj, esperantaj muzikoj, anoncoj pri eventoj de ILEI, UEA,  reklamoj kaj afribeats. La afrika reta radio estas rimedo por kun-havigo kaj disvastigo de Esperanto unue, kaj la afrikaj kulturoj al la tuta mondo. Ĝi estas fonto de diverseco kaj konstanta movo por tiuj, kiuj estas interesitaj pri Esperanto, pri diversaj kulturoj kaj divers-temaj programoj ĝenerale.






La afrika reta esperanto-radio estas atingebla per tiu ĉi ligilo : https://afrikaretradio.com/ kaj apo de la retradio estas elŝutebla ĉe playStore

***Koffiche Koufionou***

# ESPERANTO-TAGO

La jaro 1887 estas konsiderata kiel la naskiĝ-jaro de nia kara lingvo Esperanto kaj kutime memorfestata de ĉiuj esperantistoj tra la mondo, jen kelkaj kluboj rakontas kion ili faris dum tiu fosto-tago.



## Esperanto-tago en Rutshuru

Esperanto estas nunjare 136-jara! Tiu tago estas memorfestista ĉie tra la mondo, ĉu unuope ĉu multope! Kiel estas sciate, Rutshuru estas ruĝa regiono, tio estas regiono dronanta en senĉesaj malsekurecoj ekde jardekoj; tamen lokaj esperantistoj daŭre aŭdacas agadi por progresigi Esperanton.

La Klubo *Rondo Esperantista de Kiwanja*, *REK*; gvidata de Joel Muhire kunvenis en loka preĝejeto de la baptista komunumo CEBCE en la urbeto Kiwanja. Pro nefavoraj vivkondiĉoj, multaj ne povis veni, bedaŭrinde ! Antaŭ ol komenci, la pastoro Ndaziboneye Salomon preĝis kaj poste sekvis bonvenigaj vortoj de Joel Muhire.

Je tiu okazo, li parolis koncize pri la historio de Esperanto: la genezo de la lingvo, la kialoj kaj jaro de la estiĝo, la aŭtoro de Esperanto, la kongresoj, UEA, la komisionoj de UEA, Landaj Asocioj kaj lokaj kluboj.

Krome, ni instigis la komencintojn kaj progresintojn prepariĝi por la venontjara kongreso kiu okazos en Aruŝo, Tanzanio; kongreso kiun ni taksas mirinda, unika kaj mejlŝtona en la historio de la e-movado. Ni preĝas ke tiun tagon ni povu atingi en paco! Mi notas ke multaj neniam vizitis framdan landon, kaj sopiras kongresi en Aruŝo, spertiĝi pri multo kaj konatiĝi kun alilandaj samideanoj.

Ni povis ankaŭ nomumi la sekretarion de nia klubo (Dusabe Barigira) kaj la kasiston (Pastoro Ndaziboneye Salomon) kaj planis kunveni ĉiun lastan dimanĉon de monato.

Poste, ni tostis sukon kun pano, preĝis por la fermo kaj disiĝo s-ro lernejestro Rukundo, prenis kumunan foton kaj disiĝis.

***Raportas Dusabe kaj Joel Muhire.***

# REZULTOJ POST LA 8-A AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO




Sendube, la celo okazigi esperanto-kongreson en iu certa lando ĉiam estas helpi al lokaj esperantistoj refortigi la enlandan movadon kaj certe rezultiĝu el la kongreso promesplenaj rezultoj. La Afrika Esperanto de Kongreso (A.K.E) okazinta en Senegalo same respegulis tiajn perpektivojn. Unue antaŭ la Kongreso, la Afrika komisionano kaj samtempe Komisiito de TEJO pri Edukado Espoir Ngoma Kasati, sendita al Senegalo por preparkursoj antaŭ la 8-a AKE, krom la esperanto-kursoj, engaĝiĝis ankaŭ en la restarigo kaj vigligo de la Senegala junulara Esperanto-Movado, tiu laboro pluis dum kaj post lia restado en Senegalo. Helpate de Koffitche Koufionou, Francesco Maurelli, Rakoen Maerten kaj Sarah Sapro, la aktivuloj kiuj de jaroj laboradas en TEJO, helpis starigi la junularan senegalan sekcion.

Tiu dumkongresa klopodo ne venis, ĉar tuj post la kongreso tiuj junuloj entuziasmaj transprenis en mane la destinon de la junulara senegala junulara movado kaj propra-iniciate ekklopodis por fariĝi oficiale la landa sekcio de TEJO. Kelkajn monatojn poste, la junularo senegala sukcesis laŭleĝigi sian statuton kaj nun kokursas por fariĝi la landa sekcio de TEJO, ĉar nepre unue esti leĝe rekonata en sia propra lando kiel junulara organizo. Rolon gravan ludis ankaŭ Assane Faye kaj Lafi Charles Diatta. Krom tio, la junuloj agadas en diverskampe interalie en tradukado, instruado, verkado, ...

***Bamba Diaw***

# ORFINO KUMBA

Iam estis familio komponita de kvin personoj : la patro, liaj du edzinoj kaj iliaj du filinoj. La du filinoj ĉiuj havis la saman nomon : Kumba. Por diferencigi ilin, oni alnomis ilin “Kumba am nday” — Kumba kun patrino — kaj “Kumba amul nday” — Kumba, kies patrino mortis aŭ Kumba sen patrino.

La patro tiom timis la unuan, vivantan edzinon, ke li konsentis pri ĉio, kion ŝi faris kaj diris. Li lasis al ŝi taskigi Kumban la orfinon pri ĉiuj laboroj en la domo.

Iam lavante la telerojn, Kumba la orfino forgesis lavi lignan kuleron de sia duonpatrino. Furioza, la duonpatrino sendis ŝin lavi la malpuran kuleron al la Ndajana maro. Kumba, ploranta, eliris kaj ekiris. Ŝi marŝis seninterrompe du tagojn kaj du noktojn. Ŝi marŝis, marŝis ĝis kiam ŝi trovis survoje jujubarbon (jujubujon), kiu estis troŝarĝita de siaj fruktoj. Ŝi surgenuiĝis kaj ĝentile salutis ĝin. La jujubarbo al ŝi demandis :

— Do, kien vi iras bone edukita infano?

Kumba diris :

— La kunedzino de mia forpasinta patrino sendis min lavi tiun kuleron en la

Ndaja maro.

La jujubarbo donis al ŝi jujubojn kaj diris :

— Dio gvidu viajn paŝojn.

Kumba dankis ĝin kaj daŭrigis sian iradon. Ŝi ankoraŭ paŝis kaj trovis survoje kuirpoton kuiranta al ĝi mem sur fajro. Kumba la orfino genufleksiĝis kaj ĝentile salutis ĝin. La kuirpoto demandis al ŝi : Do, kien vi iras bone edukita infano? Kumba respondis ĝin : la kromedzino de mia mortinginta patrino sendis min lavi tiun kuleron al Ndayan maro. La kuirpoto prenis (iom) parton de kion ĝi kuiris kaj donacis al ŝi por manĝi. Ĝi diris ŝin : Dio gvidas viajn paŝojn. Manĝinte, ŝi dankis al ĝi kaj reprenis sian vojon. Kumba la orfino paŝis, ankoraŭ paŝis kaj trovis survoje tre maljunan virinon. Ŝi sola havis unu kruron, un brakon, unu okulon, unu orelon, un fingron, Kumba la orfino genufleksis sin kaj ĝentile salutis ŝin. La maljunan virinon demandis al ŝi : Do mia nepino, kien vi iras? La orfino respondis ŝin : Mia avino, la kromedzino de mia mortinginta patrino sendis min lavi tiun kuleron al Ndayan maro. La maljuna virino donacis al li blankan senkarnan oston. Kumba nenion diris, la maljunulino reprenis ĝin kaj meti tion en la kuirpoto ke tuj pleniĝis de viando. Ŝi ankoraŭ donacis grajnon de milio : Kumba enmetis tion en pistujon. Ŝi pistis, la pistujo pleniĝis de kuskuso. Ŝi metis ĝin en la kuirpoton; ili ekmanĝis ĝis la maljuna virino diris ŝin : Kumba, venu lavi la vazaron sen forgesi vian kuleron, antaŭ ke ĝi tute noktiĝas. Kiam Kumba finis, la maljuna virino enmanigis ŝin etan pikilon (kudrilon) kaj alian plej egan, kaj diris al ŝi :

Iru kuŝi vin sublite, ĉar ĉiuj miaj infanoj estas salvaj bestoj . La pikileta, vi uzos piki la plej malgrandajn; la granda pikilo, vi gardos por la grandaj bestoj por ke ili eliros frue. Mi ne volas ke ili mortigu vin! Kiam la infanoj alvenis, hieno, la plej obstina, diris : Patrino, estas homa karna odoro en la dormoĉambro. Ĝia patrino respondis : Vi, iru kuŝi, mi estas la sola homo ĉi tie, vi volas manĝi min nun? Kiam la animaloj kuŝis, Kumba pikis ilin per la eta pikilo, tiel puloj. La infanoj (la bestaro) nek povis dormi (dormaĉis). Ili foriris denove al iliaj aferoj. Kumba eliris de sub la lito, kaj la

maljunulo petis lin prepari sin por rehejmeniri. Ŝi donacis al ŝi tri ovojn kaj aldiris : Tion ĉi, vi rompos kiam vi estos mezboŝo. Tiu, vi rompos kiam vi ekvidos vian vilaĝon. Tiun lastan ovon vi rompos kiam vi estos eniranta al la enirejo de via vilaĝo. Atentu ne konfuzi ilin. Iru mia infano ke Dio gvidu viajn paŝojn. Kumba genufleksiĝis, salutis, dankis ŝin kaj ekiris. Ŝi paŝis, paŝis, paŝis ĝis mezboŝo, kaj rompis la unuan ovon.

Armitaj kavaliroj eliris .

Kumba reekis paŝi kaj ankoraŭ paŝis, ŝi rompis la duan ovon. Leonoj kaj panteroj eloviĝis. La kavaliroj mortigis ilin. Kumba paŝis, paŝis, paŝis. Antaŭ ol eniri la vilaĝon, ŝi rompis la lastan ovon; tre multe da sklavoj eliris kaj batis tamtamojn, kaj aliaj portis sakojn da moneroj, oron kaj ankaŭ gvidis multaj bovojn. Kiam ŝi eniris la vilaĝon, Kumba aspektis kiel reĝo. Ĉiuj eliris por rigardadi ŝin kun admiro.

**(Unua parto)**

**Johnmubaay**

**Tradikis**
**Ismaila Ndione el Senegalo**

# VIA MERKATO, KOMPANIO SUB E-NOMO EN SENEGALO





Apenaŭ fininta siajn esperanto-kursojn antaŭ la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, HAWA DIOL, bravulino el Senegalo transprenis taskojn disvastigi Esperanton instruante siajn kamaradojn perrete. Krome, ŝi proponis la uzadon de Esperanto kompanio kie ŝi laboras, en malgranda kompanio kiu vendas produktaĵojn, kie estante la kompania kunfondinto, propronis la nomon al la kolegaro kaj tio estas de ĉiuj aprobita. La kompanio nomiĝas ¨ VIA MERKATO ¨. La kompanio ¨VIA MERKATO¨ evoluas en agromanĝa prilaborado kaj renesanco de kurac-plantoj :



-  Vendado de Makedonio (karotoj, rapoj, faboj tranĉitaj en kubojn aŭ bastonetojn kaj konservitaj en poto)
- Vendado de Moringa Pulvoro (centprocente natura, organika, ĝi purigas la korpon, reduktas sukergradon en la korpo, reguligas sangopremon, batalas kontraŭ kapdoloroj, stamakdoloroj, jukanta haŭto, ktp.)
- Vendado de simia pano-pulvoro (riĉa je kalcio)
- Vendado de Kinkeliba (batalas kontraŭ la heipertensio)
- Vendado de konfitaĵoj el oranĝo, pomo, piro, ...
- Vendado de suko kaj siropo el bissapo, simia pano, kukumo, zingibro, citrono, ...



Menciindas, ke oni provas mendi la produktaĵojn de eksterlande, eksterkontinte, ekzistas servo por dissendadi la produktaĵojn eksterlanden.

Bonvolu kontakti la esperantistinon Hawa Diol per:

**Vacape : (+221) 77 602 71 59**
**Retadrese : diolhawa0@gmail.com**
**Facebook : Hawanii diol**

***Hawa Diol***

# Novaĵoj el Demokratia Respubliko Kongo




Post longa malaktivado de la konga landa Asocio de UEA, Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (D.K.E.A), kongolandanoj decidis elekti por si novan estraron por bone mastrumi la asocion, kiu laŭ statistiko, estas unu el Landaj Asocioj havantaj pli grandan nombron da Esperantistoj en Afriko, sed ofte malaktivas la Asocio ĝiaj membroj estas unuj el la plej aktivaj esperantistoj en Afriko. La decido estis aprezita de la plejmulto de kongaj esperantistoj kaj la nova estraro elektiĝis. La defio estas ege granda por la nova estraro unu e tiuj defioj estas unuigi ĉiujn kongajn esperantististojn por teama kunlaborado. Tamen la konga esperantistaro majoritate preferas labori unuopule, jes unuflanke estas bonega ideo ke ĉiu en sia loĝ-loko kreu klubon por disvastigi esperanton, sed aliflanke estas nekontentiga la fakto, ke la spertaj esperantistoj kongaj lasas la landan asocion droni preferante labori ekster ĝi.  Espereble la nova asocio-mastruma estraro scipovos arigi

ĉiujn kaj stimuli sine de konganoj la Senton labori enteame. Necesas ĉipere ekpensi pri nova strategio multe pli kunlabori kun Landaj Asocioj ol individuoj, ja tio estus la tasko de la Afrika Komisiono. Post unuanima balotado, la Konga elekta komisiono prezentis la elektitojn jene :

Prezidanto : Guy-Roger ILEKA
Unua vicprezidanto : Remond MATA
Dua vicprezidanto : Arlain KIZEYIDIOKO MAYINDA
Ĝenerala Sekretario : MAFUILA MAVOMO Jackson
Kasisto : Joel MUHIRE
Kultura Konsilanto : Paul Alcée MAZANGU DIUMBEKI
Administra kaj financa konsilanto : KAMBALE AMANI Love

Poste la balotado, la estis organizita ceremonio por transdono de povo, legu pri ĝi ĉi-sube :

Kiel anoncite, okazis transestrigo ĉe la komitato de DKEA la 23an de septembro 2023, ĉe la loko nomata SHALINO en Lingwala/Kinŝaso. La programo estis respektita krom la loko kiu ŝanĝiĝis.

Okazis unue bonvena vorto de la program-gvidanto MAZANGU DIUMBEKI Paul Alcée.

Poste, la parolado de sinjoro Florent NTOTO, la Prezidanto de la Elekta Komisiono de DKEA. Li samtempe prezentis la novelektitajn komitatanojn; prezentis la defiojn de la Konga movado antaŭ ol inviti ilin organizi la kongan movadon kaj unuigi ties esperantistojn.

Sekvis la vorto de la Eliranta Prezidanto, Sinjoro Jean Bosco Malanda. Tiun vorton legis S-ro Remond MATA pro la fakto ke s-ro Jean Bosco ne povis atingi la lokon estante for de Kinŝaso.

La ĉefa programero sekvis kun la Subskribo de la Protokolo de la transestrigo far de la eniranta Prezidanto kaj la Eliranta Prezidanto, ĉifoje reprezentita de s-ro MAFUILA MAVOMO Jackson. Sinjoro Jean Pierre Lungikisa rimetis la dosierojn al la nova komitato kaj sekvis la parolado de la nova Prezidanto kiu gratulis la elektan Komisionon, la ĉeestantojn kaj samtempe invitis ĉiujn Esperantistojn kunlabori.

Fine, okazis foto-ceremonio. Ĉio pasis en tre bona etoso senforgesi koktelon.

***Florent NTOTO***

# NOVAĴOJ EL BURUNDO




Burundo estas unu el la orientafrikaj landoj kun pluraj aktivaj esperantistoj, tie same kiel en ĝiaj najbaraj landoj, konstante okazadas Esperanto kursoj. Eĉ tro okupita, la kunordiganto de la Afrika Komisiono de la Universala Esperanto-Asocio Aimé-Patrick MANIRAKIZA decidis helpi al niaj E-instruistoj disvastigi la uzadon de nia karega lingvo Esperanto. Apenaŭ reveninta el la 108a UK en Torino, li starigis Esperanto-klubon en Buĵumburo kaj havas pli ol dekon da aktivaj lerantoj. La klubanaro konsistas el Studentoj, lernantoj kaj eĉ aliaj homoj, kiujn li mem sukcesis varbi.

***Esperanto en Afriko*** iĝis dumonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Espoir Ngoma Kasati, B.P. 1023, Lubumbashi, DR. Kongo; tel.: +243 972 716 042

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *espoirkasati@gmail.com*.

**Limdato por la 48-a n-ro:** la 2 -a de Januaro 2024

**Membroj de la Afrika Komisono (2022-2025) :**

S-ro Aimé-patrick MANIRAKIZA, **Burundo**

S-ro Koffitche Koufionou, **Togolando**

S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**

S-ino Ranja Robertine jean d'Arc Zafinitotsy, **Madagaskaro**

S-ro John E. Magessa, **Tanzanio**

S-ro Espoir Ngoma Kasati, **DR Kongo**